



NEDERLANDA ESPERANTISTO

MAANDBLAD VAN DE NEDERL. ESPERANTISTEN-VERENIGING
„LA ESTONTO ESTAS NIA”

Onder redactie van het Hoofdbestuur

REDACTEUR:

F. Weeke

Ijsseldijk 20, Diepenveen

Voor leden

gratis.

ADMINISTRATEUR:

P. M. Mabesoone

Pythagorasstr.122,Amsterdam-O.

Iets Nieuws in het Nieuwe Jaar!

Tot nu toe heeft L.E.E.N. een eigen schriftelijke cursus voor beginners gehad. De laatste jaren is het aantal deelnemers aan deze cursus zeer klein geweest, soms zelfs maar 1 of 2 per jaar en vaak werd dan de cursus nog niet eens beëindigd!

Een der oorzaken van deze geringe belangstelling is ongetwijfeld geweest het ontbreken van een doelmatige propaganda en de voornaamste reden daarvan: geldgebrek! Daar kwam nog bij, dat deze cursus niet volledig was voor de kandidaten voor het E(lemen-ta) examen, o.a. ontbraken overzichten over de historie van Esperanto, mededelingen over de Esperanto-beweging in binnen- en buitenland, op-gaven over Esperanto-literatuur. Bovendien was het cursusgeld veel, zeer veel te laag. De kosten werden maar nauwelijks gedekt; winst, door de cursus verkregen, gebruiken voor propaganda was dus uitgesloten, van een honorarium voor de cursusleider was praktisch geen sprake.

Een wel zeer grondige reorganisatie was hier dringend noodzakelijk.

Voor één moeilijkheid was echter geen oplossing te vinden, nl. waar halen we het geld vandaan om een voortdurende propaganda te voeren, die het *gehele land* zal bestrijken? Adverteren in dagbladen of tijdschriften zou duizenden guldens per jaar kosten! Een verhoging van het cursusgeld of zelfs een verhoging van de contributie zou hier beslist geen uitkomst bieden.

Maar als de nood het hoogst is, is de redding nabij! En de nood was hoog! Immers, een vereniging met een ledental, dat niet vooruit gaat, zoals bij L.E.E.N. het geval is, staat niet slechts stil, doch gaat in waarheid achteruit, de ondergang tegemoet. Roemloos, indien men niet alle pogingen in het werk heeft gesteld om de vereniging nieuw leven in te blazen, in dit geval dus nieuwe leden te bezorgen. En nu de redding, waarbij allen, afdelingen en algemene leden, niet alleen de helpende hand *moeten*, doch ook heel gemakkelijk *kunnen* bieden!

Na verschillende mogelijkheden ter verbetering van de cursus en van de propaganda overwogen te hebben heeft het hoofdbestuur contact gezocht met de Leidse Onderwijs-Instellingen (verder in dit artikel *L.O.I.*), een in heel Nederland, door zijn voortreffelijke schriftelijke cursussen, bekend instituut. De onderhandelingen met de *L.O.I.* zijn zeer aangenaam en vlot verlopen, (waarvoor wij op deze plaats aan de directie onze welgemeende

LA ĈEFESTRARO DEZIRAS AL
VI ĈIUJ ĈION BONAN POR
LA NOVA JARO KAJ GI ES-
PERAS, KE ANKAŬ POR NIA
ASOCIO LA NOVA JARO AL-
PORTOS MULTE DA PROS-
PERO PERE DE NIA KOMU-
NA LABORO.

dank uitspreken) en hebben tot resultaat gehad, dat er nu een samenwerking tot stand is gekomen tussen de L.O.I. en L.E.E.N. betreffende de schriftelijke Esperanto-cursus.

In het kort volgt hieronder een overzicht van de belangrijkste punten uit deze overeenkomst:

a: de schriftelijke Esperanto-cursus van de L.O.I. komt onder auspiciën van L.E.E.N.; dit zal vermeld worden met nog enige bijzonderheden over onze vereniging in het talenprospectus, dat de L.O.I. a.s. zomer uitgeeft;

b: in het maandblad van de L.O.I. „Studium Generale” (abonnementsprijs f 8,50 per jaar), dat een oplage heeft van 25.000 exemplaren, zullen van tijd tot tijd artikelen over Esperanto verschijnen, waarvoor L.E.E.N. zelf de auteurs kan uitkiezen;

c: elke Esperanto-cursist zal in de 11-e les een circulaire op briefpapier van L.E.E.N. aantreffen, waarop al onze afdelingen staan vermeld met de namen en adressen der afdelingssecretarissen. De cursisten worden met deze circulaire uitgenodigd de clubavonden van onze afdelingen te bezoeken teneinde enigszins vertrouwd te raken met het *gesproken* Esperanto;

d: nadat de cursist 12 lessen heeft gevolgd (en dus inmiddels onze circulaire heeft ontvangen) krijgt hij voortaan iedere maand „Nederlanda Esperantisto” toegestuurd;

e: L.E.E.N. krijgt van alle cursisten naam en adres, zodat wij zelf contact met hen kunnen opnemen;

f: voor elke cursist, die L.E.E.N. aanmeldt, geeft de L.O.I. een vergoeding voor de gemaakte onkosten.

Als U deze opsomming nauwkeurig hebt gelezen, zult U wel bemerkt hebben, dat de voordelen van deze samenwerking voorlopig alleen nog aan onze kant zullen zijn. Het is echter niet meer dan betamelijk, dat ook de tweede partner het zijne bijdraagt om tot een intensieve en vruchtdragende samenwerking te komen. Daartoe is de hulp van onze leden noodzakelijk.

Hoe U dat kunt doen? Door naam en adres van iedereen, die belangstelling toont voor Esperanto en het wil gaan leren, op te geven aan ons secretariaat. Een prospectus over de cursus wordt dan dadelijk toegezonden. Vooral de afdelingen, die geen

leiders hebben voor een mondelinge cursus, kunnen op deze manier trachten hun ledenaantal te vergroten. De algemene leden kunnen ons helpen in die plaatsen, waar geen afdelingen van onze vereniging bestaan.

De cursus bestaat uit 28 lessen en het cursusgeld bedraagt f 42,—. De duur van de cursus kan men zelf bepalen, deze is afhankelijk van het aantal lessen dat men per maand wenst te ontvangen. Gewoonlijk is dit aantal 4, zodat men dus na 7 maanden de cursus heeft beëindigd en eventueel examen kan doen. Het cursusgeld kan in termijnen worden betaald.

Voor één ding vragen wij echter Uw speciale aandacht. *Geef de namen en adressen van belangstellenden en/of cursisten alleen door aan onze secretaresse mej. Th. E. S. van den Reijen, Rijksstraatweg 90, Haarlem (N.); telefoon: 0 2500-57433.* Dus niet rechtstreeks aan de L.O.I., daar alleen de aanmeldingen, die via ons secretariaat binnenkomen, beschouwd zullen worden als aanmeldingen van L.E.E.N.

Helpt U allen mee om het jubileumjaar 1959 tot een gedenkwaardig jaar voor onze vereniging te maken? Probeer U allemaal eens om in dit jaar één nieuw lid te winnen. Iemand heeft eens gezegd: „Kaptu ĉiun jaron unu viktimon kaj esperantigu lin”. Laten wij deze raad ter harte nemen!

Wij wensen U veel succes toe in het nieuwe jaar, niet alleen bij Uw pogingen om onze vereniging vooruit te helpen, maar vooral ook bij Uw streven om de welstand en het geluk van U en Uw gezinsleden te bestendigen of te vergroten. Een voorspoedig en gelukkig 1959!

Th. E. S. v. d. Reijen.

GLUMARKOJ.

U.E.A. eldonos glumarkojn okaze de la 100-a naskigdatreveno de d-ro Zamenhof. *Sekciaj membroj* sendu la mendojn al la sekcia sekretario. La sekciaj sekretarioj same kiel la ĝeneralaĵo membroj menuu ĉe nia sekretariino: f.ino Th. E. S. v. d. Reijen, Rijksstraatweg 90, Haarlem. La prezo estas f 0,50 por 100 glumarkoj, inkluzive la afrankon. Oni povas pagi pere de la poŝtgirkonto 34563, L.E.E.N. Amsterdam aŭ pere de neuzitaj poŝtmarkoj.

KOMUNIKOJ DE LA ĈEFSTRARO.

Esceptokaze aperas en ĉi tiu numero ĉefartikolo en la nederlanda lingvo, ĉar ni opinias ĝin tiel grava, ke ĝi estu legebla ankaŭ por ne-esperantistoj. La kunlaboro kun la Lejdena Instrua Instituto ja havas ne nur praktikan, sed ankaŭ propagandan valoron. Tial estos bone, ke niaj gemembroj montru ĉi tiun numeron al geamikoj kaj gekonatoj, atentigante ilin pri tiu artikolo. Speciale en tiuj lokoj, kie oni ne disponas pri kapabla kursgvidanto aŭ kie la nombro da personoj, kiuj volas lerni nian lingvon estas tro malgranda por starigi ordinaran kurson, estas granda avantaĝo povi nun atentigi tiujn personojn pri ĉi tiu bonega skriba kurso, okazanta sub la aŭspicioj de L.E.E.N. pere de la konata Instrua Instituto en Lejdeno. La kurso vere ne estas multekosta, se oni atentigas, ke por ĉiu leciono oni fakte pagas nur 1,50 gld. kaj krome la kurso preparas la kursanojn por la E-diplomo! Ĉiu leciono estas presita sur bona papero kaj havas agrablan aspekton. Pli multe ni ne bezonas diri ĉi tie, la artikolo ja parolas por si mem, sed ni volas ankoraŭ forte substreki ke la interesigantoj *nepe* anoncu sin *sole* ĉe nia sekretariino f.ino Th. E. S. v. d. Reijen, Rijksstraatweg 90, Haarlem (N.).

NIA ORGANO. La ĉefestraro jam longe cerbumis pri tio, kiamaniere plibeligi kaj pligrandigi nian organon, sed ĉar ĝi en la nuna formo jam kaŭzas sufiĉe grandajn elspezojn, ni ne povas riski elspezi pli multe da mono por ĝi. La nura solvo de ĉi tiu problemo estas trovi vojon por akiri pli da mono kaj ni opinias ke tio estus ebla, se ĉiuj gemembroj kunhelpus en tio pere de la kolektado de anoncoj. En la Zamenhofa Jaro 1959 ni tre ŝatus povi aldoni al la organo belan kovrilon kaj tio povos, se ni sukcesos kolekti sufiĉe da anoncoj pagataj. Tial ni urĝe petas niajn gemembrojn klopodi akiri de entreprenoj, komercistoj aŭ butikistoj, ĉe kiuj oni regule ion aĉetas, anoncojn por nia gazeto. La taktiko devas esti akiri prefere anoncojn de ĉiu anoncanto por la tuta jaro, ĉar tio donos al ni la plejgrandan profiton kaj estos samtempe plej malmultekoste por anoncanto, ĉar anoncanto dum la tuta jaro donas pli da rabato ol anoncanto en kelkaj nu-

mero. Se ni povos akiri du paĝojn da anoncoj laŭ la tarifo ĉi sube menciita, ni povos efektiviĝi nian planon. Se oni sukcesos kolekti anoncojn, oni sendu la tekston al nia redaktoro klare indikante la formaton kaj la nombron da enpresigoj kaj la kondiĉo estas, ke ĉiu anonco devas esti pagata tuj post la unua apero. La tarifo por la anoncoj estas jena:

por 1/1; 1/2; 1/4; 1/8 kaj 1/16 paĝo ĉe unufoja enpresigo respektive 56,—; 28,—; 14,—; 7,— kaj 3,50 gld. ĉe plurfoja enpresigo de la sama teksto 5% da rabato por ĉiu plia fojo.

Ekz. 1/4 paĝa anonco 5-foje enpresigita kostos $5 \times 14,- \text{ gld.} = 70,- \text{ gld.}$ Rabato $4 \times 5\% = 20\% = 14,- \text{ gld.}$ La finsumo estas $70,- \text{ gld.} - 14,- \text{ gld.} = 56,- \text{ gld.}$ La sama anonco 11-foje enpresigita kostos $11 \times 14,- \text{ gld.} = 154,- \text{ gld.}$ minus $10 \times 5\% = 50\%$ da rabato = $77,- \text{ gld.}$ Do $154,- \text{ gld.} - 77,- \text{ gld.} = 77,- \text{ gld.}$ Kiel oni vidas por 6 pliaj fojoj la prezo altiĝis nur per 21,— gld. Vi mem nun povas kalkuli la prezon de ĉiu anonco laŭ unu el la nomitaj formatoj. Por montri al vi, ke la prezoj vere ne estas tre altaj, ni donas ankoraŭ la prezon por 1/16-paĝa anonco 11-foje enpresigita t.e. *19,25 gld.* Tio estas por ĉiu fojo fakte nur 1,66 gld. Kaj nun eklaboru, karaj gemembroj. Ni estas scivolaj, kiu sendos al ni la unuajn anoncojn kaj kiu atingos la plej altan sumon.

BILDPOŝTKARTOJ KUN ESPERANTO-TEKSTO.

Dum la 43-a Universala Kongreso en Mainz oni bedaŭrinda ne povis aĉeti bildkartojn kun Esperanto-teksto. Tiel oni devis sendi al gekonatoj en la diversaj landoj bildkartojn kun nacilingvaj tekstoj, kio laŭ mi estas stranga afero ĉe okazantaĵo tiel internacia kiel U.E.A.-kongreso.

Bildpoŝtkarto, tiel internacie uzata, estas tre bona aĵo por uzi laŭ plej efika maniero la internacian lingvon. Tial ni decidis en Arnhem mem eldoni kvanton da kartoj, kun kvar diversaj bildoj de nia urbo. Dorsflanke ni presigis la Esperanto-tekston, kompreneble fakte nur klarigon de la bildo kaj bildflanke jam troviĝis la Nederlanda teksto. Tiel la kartoj estas dulingvaj, do ankaŭ uzablaj por ne-Esperantistoj.

44-a Universala Kongreso de Esperanto

Varsovio — 1 ĝis 8 aŭgusto 1959 —
Pollando

Jubilea Zamenhofa Jaro

Sub honora protektado de la Ministro-
Prezidanto de la Pola Popola Respu-
bliko

JOZEF CYRANKIEWICZ

ADRESO: 44-a Universala Kongreso
de Esperanto, Varsovio.

TELEGRAMOJ: Esperanto-Kongreso,
Warszawa.

BANKO: Narodowy Bank Polski,
Warszawa, VII O.M. nr. 1531-9-525.

OFICIALA KOMUNIKO

GLUMARKOJ:

La Loka Kongresa Komitato alvokas la esperantistojn tra la tuta mondo vaste aĉeti la kvarkoloran jubilean kongresan glumarkon. Ĝi estas mendebla je prezo de 0,25 us. dolaroj por folio de 25 markoj ĉe la Landaj Asocioj aŭ ĉe: 44-a Universala Kongreso, Varsovio.

POSTKONGRESO:

La Loka Kongresa Komitato elektis Krakovon kiel postkongresan urbon /9-12 aŭgusto 1959/. La postkongresa ekskurso okazos kunlige kun la postkongreso.

JUNULA VESPERO:

La Loka Kongresa Komitato decidis, ke dum la Universala Kongreso okazu Junula Vespere dediĉita al la esperantista junularo.

JUNULARKUNVENO:

La 15-a Internacia Junularkunveno en Gdansk /Dancigo/ anoncas jenan provizoran programon: Interamikiĝa ves-

Plej agrable ni spertis la helpon de s-ro A. Bruinier, direktoro de konata presejo de bildpoŝtkartoj en Arnhem.

Nun ni povas okaze de letervespero, dum la monato de internacia korespondado aŭ ĉe privata korespondado uzi vere internaciajn kartojn, kies teksto estas komprenebla kie ajn en la mondo. Ĉu eble imitinda ekzemplo por aliaj sekcioj?

H. G.

pero, solena inaŭguro, diservoj en Esperanto, vizitado tutaga de Triuroboj /aŭtobusekskurso tra la regiono/, jahtekskurso, kulturaj prelegoj, oratoria konkurso, folkloraj danĉespejoj, laborkunsidoj de TEJO, renkontiĝo kun loka neesperantista junularo, solena fermo, forveturo de partoprenantoj al 44-a Universala Kongreso en Varsovio.

BLINDULKONGRESO:

La 29-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj okazos de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 1959 en la kadro de la Universala Kongreso.

KUNVENO DE M.E.M.:

Mondpaca Esperanto-Movado anoncas sian Kongreson en la kadro de la Universala Kongreso.

BIOLOGIA JARO:

Parto de la prelegoj de Internacia Somera Universitato, kiuj okazos en Varsovio, estos dediĉitaj al temoj en la kadro de la Internacia Biologia Jaro, kiu estos festata en 1959 en la tuta sciencista mondo, honore al la 150-a naskiĝdatreveno de Darwin.

A F I Ŝ O :

La Ŝtata Turisma Komitato en Pollando eldonis grandan nigre-blankan afiŝon pri Varsovio, 70 x 100 cm., kun dukolora teksto en Esperanto. La afiŝo estas ricevebla ĉe la Landaj Asocioj aŭ en landoj, kie ne ekzistas Landa Asocio, de: 44-a Universala Kongreso de Esperantistoj, Varsovio.

STATISTIKO:

Arabujo 1, Argentino 1, Aŭstralio 2, Aŭstrujo 6, Belgujo 9, Brazilo 3, Britujo 24, Bulgarujo 5, Danlando 16, Etiopio 1, Finnlando 3, Francujo 41, Germanujo 40, Hispanujo 5, Islando 2, Italujo 26, Japanujo 1, Jugoslavio 24, Kanado 1, Maroko 1, Meksiko 1, Monako 5, Nederlando 6, Norvegujo 3, Novzelando 1, Pollando 137, Sovetunio 2, Svedujo 27, Svisujo 8, Sudafriko 1, Urugvajo 1, Usono 3. Entute 407 el 32 landoj. /Pasintjare 316 el 25 landoj/.

G. C. Fighiera,

Konstanta Kongresa Sekretario

Ĉu vi jam kontribuis
al
Mabesoone-Fondaĵo?

Interesa Eksperimento kronita de plena sukceso.

(daŭrigo de p. 77)

..... Ĝi estas preferata ripo-
amuzejo por turistoj, kiuj kuŝas flankon al flanko sunalpreĝantaj aŭ refreŝigantaj sin en la akvo. Laŭinforme tiu lago estas la plej varma en la tuta lando dank' al la varmakvofontoj. Oni vidas tie multajn sanatoriojn, kie ĉiaj malsanuloj klopodas retrovi la perditan sanon. Ni restis kelkajn horojn ĉe la bordo por doni okazon al tiuj, kiuj deziras tion, naĝi en la lago.

Nun la veturilo leviĝas al la plej alta pinto de Aŭstrio, Gross Glockner (3798 m). Tiu altalpa vojo, malfermita por la trafiko en 1924-a, multe uzata kaj vizitata, montras al la vizitanto nekutime belegan montpejzaĝon. La vojo estas alirebla nur en la periodo de la 1-a de junio ĝis la 31-a de oktobro. Ĉe ĉiu kurbigo ĉirkaŭ tiu giganto oni ĝuas novan panoramon. La veterdijoj favoris la grupanojn, ĉar la vetero lasis nenion por deziri, la ĉielo estis preskaŭ sennuba, feliĉe mankis la ofte pendantaj nebulvualoj ĉirkaŭ la kapo de la monto. Speco de imposto estas pagenda por veturi sur la vojo. Personoj pagas po 20 ŝilingoj, aŭtomobiloj po 60 ŝilingoj. Certe por iom kompensi la grandegajn kostojn de

konstruado kaj konservado. Rigardinte la glaciejon, ni malsupreniris al Heiligenblut kaj de tie al nia finstacio de tiu tago, Niedernsill.

La programo menciis viziton al la elektra centrejo de Kaprun situanta meze de la grandioza Alpomondo. Oni povas viziti tiun imponan elektran energiejon, sed ne per privata aŭtomobilo aŭ per aŭtobuso, ĉar la vojoj supren estas tre mallarĝaj. La transportado tien okazas ekskluzive per aŭtobusoj de la aŭstra poŝt servo kaj parte, sur la plej krutaj deklivoj, per grandega lifto por personoj, kiu povas porti 140 homojn. Alvenante supre sur la monto, oni vidas kelkajn grandajn artefaritajn lagojn, en kiuj la pintoj de la montoj bele speguliĝas. Per retendigoj oni kolektas la necesan akvon en la lagoj por siatempe transigi ĝin en elektran energion. La tekniko kreis ĉi tie harmonian tutecon, samtempe servante kaj donante al la homaro.

Post tiu vizito ni direktis niajn rigardojn denove al nia elirpunkto Salzburgo, vojo kondukanta parte tra

(daŭrigo s.p. 8)

SCHRIFTELIJKE KURSUS

in samenwerking met de

Leidse Onderwijs-Instellingen

Inlichtingen en aanmeldingen:

Alleen via ons sekretariaat:

Mej. Th. v.d. Reijen, Rijks-
straatweg 90, Tel. 0 2500/57433,
HAARLEM.

6-a BENELUKSA KONGRESO ESPERANTISTA

16 - 17 - 18 de majo 1959-a, Haarlem.

En la decembra numero de N.E. vi trovis la aliĝilon. Pli da ili estas haveblaj ĉe la sekretariejo de nia asocio, Rijksstraatweg 90, Haarlem. Estas rekomendinde frutempe ensendi la aliĝilon, ĉar per tio vi multe helpas al la L.K.K. Nia loĝiga komitato klopodis mendi tranoktejon en amasrestadejo, sed vane. Pri la hoteloj ni esperas al vi ion komuniki en la februara numero de N.E., ĉar ne pli frue ol en januaro la listo de hoteloj kaj pensionoj estos haveblaj.

L.K.K.

TRILANDA RENKONTIGO.

La 13-an kaj la 14-an de decembro okazis en Verviers denove la trilanda renkontiĝo inter belgoj, germanoj kaj nederlandanoj. Ĉeestis ankaŭ franco, bulgario, indoneziano kaj japano. La Esperanto-grupo de Verviers samtempe festis sian oran jubileon. En granda magazeno oni dum kelkaj semajnoj okazigis Esperanto-ekspozicion. Sabate estis la festvespero, kiun ĉeestis ankaŭ multaj ne-Esperantistoj. Dimanĉmatene oni metis florojn ĉe la monumento de la nekoflora soldato kaj poste sekvis la akcepto fare de la urbestro kiu en sia parolado memorigis la helpon kiun la urbestro antaŭe povis doni al la Esperanto-movado en Verviers. Posttagmeze okazis kunvenoj. S-ro Jau-motte, la prezidanto de la Reĝa Belga Ligo Esperantista, petis la helpon de ĉiuj gemembroj por ke la estonta universala kongreso kiu okazos en 1960 en Bruselo estu kiel eble plej bone preparata.

Estis tre agrabla renkontiĝo.

MONDPACO PER TUTMONDA JURA ORDO.

Tio ĉi estas la kerno de la afero, la deirpunkto de la Mondfederalista Movado, tendenco, kiu depost 1946 en multnombraj landoj kolektis post si dekmilojn da adeptoj. Tiuj ĉi homoj ne deziris esti endormigataj de la liberec-ebrio kaj la kriado: „Nun neniam plu ni havos militon”, kiu manifestiĝis en ĉiu lando post la dua mondmilito. Tamen la ebleco de nova mondmilito tute ne malaperis, ĉar ĝia kaŭzo ne estis forigita.

Kiam en la pasinteco oni interkonsideris la eblan kaŭzon de milito, tiam ekzistis sufiĉe granda diferenco de opinio pri tiu punkto. Unu serĉis ĝin en la ekonomiaj diferencoj, pro kiuj pli malriĉa lando perforte klopodis superregi la pli riĉan landon. Dua kulpigis la politikon kaj indikis la eternan malamikecon inter unuflanke la kapitalismo kaj aliflanke la ŝtatsocialismo kaj la komunismo. Tria opiniis, ke la armilfabrikistoj ja volas vendi siajn produktojn kaj kompreneble tio estas ebla nur pere de milito.

Pro tio estis granda surprizo, kiam post la milito la amerika verkisto Emery Reves montris en sia libro „La Anatomio de la Paco”, ke ĉiuj tiuj argumentoj ne estas defendeblaj, ĉar en la nacia ŝtato malriĉuloj kaj riĉuloj, socialistoj, komunistoj kaj kapitalistoj vivas paco unu flanke de alia, sen ke ekestas eksplodo, pro kiu oni kaptas la armilojn. Kaj kial tio ne okazas? Ĉar oni ĉi tie vivas kiel individuo submetita al jura ordo, kiu garantias la vivon de ĉiuj subuloj, dum la „forta brako” intervenas, se oni klopodus devii de tiu ĉi leĝo kaj perforte minacas la vivon de sia proksimumo.

El Niaj Sekcioj.

Sekcio Zaandam.

Sekr.: P. L. Takstraat 64

Vendredvesperon, la 30-an de januaro 1959-a, je la oka horo okazos nia kontaktvespero en la supra salono numero 5 de la konstruaĵo: Christelijke Belangen, Botenmakerstraat 16.

Aktuala kongresa programo kun i.a. montrado de fotoprojekcioj de nia ĉefestrarano B. J. J. Albers pri la Majenco kongreso esperigas la ĉeeston de multaj geanoj.

La estraro.

La kaŭzo do troviĝas nur en la konstelacio de la nacia ŝtato, kiu alproprigas al si la rajton agi per armiloj, se ĝi opinias tion necesa.

Ne ekzistas ja jura ordo super tiu nacia ŝtato, kiu povus malebligi al ĝi fari tion. Kompreneble instance tiu rajto estas donita al la ŝtato por ŝirmi siajn civitanojn kontraŭ eksteraj atakoj. Sed en la nuna epoko kaj ĉe la evoluado de la modernaj armiloj neniu lando povas ankoraŭ doni tiun sekurecon al tiuj civitanoj (la angla ministroprezidanto malkaŝe konfesis tion), dum krom tio ekzistis kaj povos veni ŝtatoj, kiuj misuzos ĉi tiun al ili dontan potencon, atakante aliajn ŝtatojn.

Tiel longe kiel la nacia ŝtato gardos ĉi tiun potencon, milito ĉiam montriĝos ebla. Nur se ili estos pretaj rilate al ĉi tiu punkto cedi sian suverenecon kaj transdoni ĉi tiun potencon al supernacia organizo, povos komenciĝi epoko de vera mondpaco.

Sen internacia jura korporacio, subtenata de supernacia polica armeo, ĉi tiu paca situacio eble provizore estas efektivebla (per interkontraktoj, per timo de unu por la alia k.t.p.), sed ĝi neniam montriĝos daŭra. La historio ripete pruvis tion.

Ankaŭ la registaroj de diversaj landoj iom post iom komprenas tion, kiel atestas la prezentado de estontaj internaciaj konfliktoj antaŭ la U.N. kaj la agado de la polica armeo. Tamen oni ankoraŭ ne kuraĝas fari la sekvontan paŝon, nome doni daŭran staton al ĉi tiu polica armeo kaj transdoni parton de la nacia suvereneco al supernacia korporacio (en la U.N. ĉiu lando nuntempe ankoraŭ gardas komplete sian suverenecon).

Por disvastigi ĉi tiun vidpunkton inter la homoj kaj per la gazetaro oni fondis la Mondfederalisman Movadon. Preskaŭ ĉiu interkonsentas kun niaj intencoj, sed nur malmultaj komprenas, ke por tiu ŝanĝo — precipe kiam ĝi havas politikajn konsekvencojn — oni devas batali kaj ke nur simpatio ne sufiĉas. Nia parlamento devos esti konvinkata, ke la nederlanda nacio deziras tutmondan juran ordon por si mem kaj por la posteuloj kaj la plua ekzistado de ĉi tiu mondo. Tial mi alvokas ĉiujn, kiuj povas konsenti kun niaj ideoj, por kolektiĝi en nia movado kaj aliĝi kiel membro ĉe nia sekretariejo Hyacinthweg 11, Den Haag. Th. E. Knegt.

LA STUDANTO

Jen ekzempla traduko de

Ekzerco 52 A:

ĈU DUBO PRI LERNODEVO?

Johano estis sesjara (havis ses jarojn) kaj povis, ne, devis unuafoje (= por la unua fojo) viziti la elementan lernejon (= iri al la elementa lernejo; uzu la *helpverbon devi* nepre ne sen infinitivo!). La leĝo pri la lernodevo devigis lin al (ankaŭ: pri) tio, sed li ne konsciis pri tio. Kiam li estis pasiginta (aŭ en unu vorto: Pasiginte) la unuan matenon sur la lerneja benko, li salutis la instruistino kaj diris trankvilige al ŝi:

„Ĉi tiu mateno tre plaĉis al mi. Eble mi revenos (ne: revenas!) posttagmeze aŭ morgaŭ....”

Jen ekzempla traduko de

Ekzerco 51 B:

LA VANELA OVO.

En Frislando la serĉado pri (*prefere ne: de, ĉar estas serĉado de homoj pri ovo; studu „Plenan Gram.” par. 263 kaj 264*) vanelaj ovoj estas tre ŝatata printempa sporto. Multaj Frisoj (*la vortaro de Van Straaten donas en la N.-E.-parto la formojn Frizo kaj Frizlando, sed en la E.-N.-parto la vortojn kun s, kiujn mi preferas, ĉar por frizo oni iras al la frizisto!*), maljunaj same kiel junaj (aŭ: kàj maljunaj kàj junaj) iras (ekvagas) en la printempo (printempe) kun saltostango (-bastono) sur la ŝultro en la liberan kamparon (*direkta akuzativo!*) kaj observas (rigardas) la konduton de la herbejaj birdoj, precipe la vaneloj, atente (aŭ: atente observas k.t.p.). La sciulo (scianto, spertulo, kompetentulo) povas vidi laŭ la konduto de la birdoj (aŭ: povas konkludi el k.t.p.), ĉu ili metis ovon kaj, se jes, kie. Kiu trovas la unuan vanelan ovon en la printempo, sendas ĝin al la reĝino kaj ricevas tiam princan rekompencan.

Jansma ofte estis esperinta iam esti la unua kaj akiri tiun rekompencan, sed iu alia (aliulo; alia persono) ĉiam estis (*prefere uzu simplan verboformon, se la frazo estas tiam klara*) antaŭ li, ĝis (ne necesas uzi „ĝis kiam”, ĉar „ĝis” estas kàj prepozicio kàj konjunkcio, do la konjunkcio „kiam” estas superflua, ple-

onasma) li ĉi-printempe trovis vanelan ovon en la kampo (ne: lando! Danujo k.t.p. estas lando) de sia najbaro ankoraŭ antaŭ la unua de marto. Ravita li venis hejmen. Entuziasma li montris la ovon, sed subite ĝi falis sur la plankon (*se estas ekstere: sur la teron*). J. rigardis unue konsternite (*adverbo, ĉar ĝi indikas la manieron de rigardado; ankaŭ: seniluziĝinte*), tiam mire (mirigite) kaj poste malembarasite: la ovo montriĝis kuirita.... Lia najbaro verŝajne ŝerce (moke) trompis lin.

NOVAJ EKZERCOJ

Ekzerco 53 A:

(por gekomencantoj):

Elektu el al interkrampaj vortoj la ĝustan:

NOVA JARO.

1: La malnova jaro (ĉesis; ĉesigiĝis; finis; finiĝis). 2: Ni (komenciĝis; komencis; komencigis) novan jaron. 3: Ni deziris (al; de; ĝis; por) niaj geamikoj kaj gekonatoj feliĉon kaj (prosperon; profiton; gajnon) en la nova jaro. 4: (Multaj; Multe da) geparencoj kaj geamikoj sendis al ni (iliajn; siajn) (plej; pli; plu) bonajn dezirojn. 5: (Iliaj; Siaj) deziroj ofte estis sur (belaj; bele) (ilustritaj; ilustritaj) kartoj. 6: Tiaj kartoj ĉiam (multaj; multe) (ĝojigis; ĝojas; ĝojigas) nin. 7: Ni (kare; kore) dankas ĉiujn (gesendintojn; gesenditojn) (je; kaŭze de; por; pro) la (sendintaj; senditaj) (postaĵoj; poŝtaĵoj) kun bondeziroj. 8: (Nu; Nun) ni (komencas; komencigas) la novan jaron kun nova (kurago; kuraĝo). 9: Ni esperas, ke ĉiuj (gestudintoj; gestuditoj) estas ankaŭ (geekzercontoj; geekzercotoj) de la rubriko „La Studanto”. 10: Ni (deziras sopiras; gratulas) (al; ĝis; por) ĉiuj gesamideanoj progreson kaj feliĉon (en; dum; tra) la tuta jaro (la tutan jaron).

Ekzerco 52 B:

(por geprogresintoj):

Skribu anstataŭ la kursiva subpropozicio adjektan aŭ adverban participon eventuale kun komplemento(j). Ekzemploj:

Ned. Esperantisten-Ver. „La Estonto Estas Nia”.

DAGELIJKS BESTUUR:

F. Weeke, IJsseldijk 20, Diepenveen: voorzitter en vic-ĉefdelegito U.E.A.

E. de Wolf, Joh. de Breukstraat 18, Haarlem: vice-voorz. en 2-e sekr.
Telef. 0 2500-56133.

Mej. Th. E. S. v. d. Reijen, Rijksweg 90, Haarlem: sekr.esse.
Telef. 0 2500-57433.

B. J. J. Albers, Olympiaweg 69 III, Amsterdam (Z.): penningmeester.
Postrek. 34563. Telef. 0 20-734601.

MAGNETOFOON-DIENST:

Joh. de Breukstraat 18, Haarlem.

BOEKENDIENST:

Mevr. S. Mabesoone-Visser, Pythagorasstraat 122, Amsterdam (O.).
Postrek. 76915.

BIBLIOTHEEK:

E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.

ALG. NED. ESP. EXAMENCOMMISSIE:

Mej. H. M. Mulder, Zilvermeweg 29, Badhoevedorp: sekr.esse.

FONDAJO-MABESOONE:

Mej. J. E. Prins, Hora Siccamasingel 294, Groningen: penn.esse.
Postrek. 815889.

ĈEFDELEGITO U.E.A.:

J. Telling, Schietbaanlaan 106 a, Rotterdam. Postrek. 242619.

PROPAGANDA-DIENST:

J. Calado, Vergeet-mij-nietstraat 29 b, Rotterdam.

ESPERANTO-PERSDIENST L.E.E.N.: Zaandam.

Dum li legas la gazeton, li ŝatas aŭskulti radiomuzikon = Legante la gazeton, li ŝatas aŭskulti radiomuzikon.

Oni admiras homon, kiu harpludas = Oni admiras homon harpludantan.

ANEKDOTO.

1: Oni ĉiam ĝojas, kiam oni legas aŭ aŭdas bonan anekdoton. 2: Kiam oni estas leginta aŭ aŭdinta anekdoton, oni ŝatas rakonti ĝin al aliaj personoj. 3: *Ĉar mi legis bonan anekdoton*, mi volas ĝin rakonti nun al vi. 4: Churchill, kiu estas konata tra la tuta mondo, sidas en salono. 5: Antaŭ ol li parolados, li fumas dikan cigaron. 6: Du sinjoroj kiu sidas malantaŭ li, mallaŭte parolas pri li, kiam ili atente rigardas al lia dorso. 7: Unu el ili diras: „Se oni bone observas la maljunulon, oni klare povas konstati, ke li kadukiĝis. 8: Post kiam li aŭdis tiujn parolojn, s-ro Winston turnis sian kapon al la sinjoroj, dum li diris: 10: „Pluraj homoj, kiu

neniam parolas kun li, asertas, ke li estas ankaŭ surda!”

Ekzercojn korektotajn la gelegantoj sendu (kun afrankita koverto por la resendo!) al la kompiladanto de la rubriko: S. S. de JONG Dzn, Waltweg 3, TJERKWERD (Fr.). Tel.: 0 5157-9146.

(daŭrigo de p. 5)

Germanio. Vespere ni adiaŭis unu la alian, sed antaŭe oni iom honoris la du gvidantojn de nia karavano, s-ron Steppan, iniciatinton de la tuta projekto kaj prizorganton de la granda administra laboro, due s-ron Fötinger, kiu renkontis kaj devis solvi lavangon da problemoj. Finfine li sukcesis kontentigi preskaŭ ĉiujn partoprenantojn, kiuj ege kontentaj, serĉis siajn loĝejojn kaj certe longe restos en ilia memoro tiu eksterordinare bela vojaĝo, kiu denove pruvis tiom klare la utilecon de nia unika lingvo.

Kompilis

J. KUIJPERS, ROTERDAMO.